

SENNACIUOLA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 6

REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT

N-o 6

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

JESUO BARABBAS

En sveda lingvo ne aperas liberpensula gazeto, ankaŭ ne multe da liberpensula literaturo. Nur la komunista gazetaro enhavas kontraŭreligiajn artikolojn. Dum la lasta tempo aperis multe da religia literaturo, kaj multaj pastroj pledas por kunlaboro inter ŝtateklezio kaj socialdemokratio. Ĉefpastro Thysell skribis libron: "Kristanismo kaj la laborista movado", en kiu li montras per ekzemploj, kiel socialdemokrataj gvidantoj svedaj pli kaj pli komencis vere interesiĝi pri religio kaj kiel ili per siaj agoj helpas la eklezion. Sed pri tio alian fojon mi parolos.

Aliaj teologoj nun treege diskutas la problemon pri Jesuo. Kelkaj teologoj ankoraŭ diras, ke Jesuo ne estis nature naskita, dum aliaj pledas por lia natura naskiĝo. Kelkaj predikas ankoraŭ pri lia reviviĝo, dum aliaj diras, ke li nur estis ŝajne mortinta kaj aliaj tute neas pri lia reviviĝo.

Dum la pastroj diskutas pri la plej certa vojo al la ĉielo, dum ĉiuj predikantoj, al kiu ajn religio ili apartenas, savas homojn por bona monsumo, tamen aperas homoj, kiuj ŝercas tre akre kun la trompuloj, en formo de satiro mokas la malsaĝon.

Sveda aŭtoro Hjalmar Söderberg aperigis libron sub la titolo: "Jesuo Barabbas", en kiu li citas kelkajn tre gravajn fontojn, kiuj kontraŭdiras al la predikoj de la pastroj. La ĉefpersono de la libro estas maljuna leŭtenanto, ribelanto kontraŭ la religiaj kredoj. Li loĝas en Kopenhago kaj havas kamaradon el aliaj ĉiuspecaj pekuloj, tre inteligentaj homoj, kiel ekzemple antikvajvendisto Marin, sperta en teologio, konante diversajn fontolibrojn en greka kaj aramea lingvoj. En sama domo loĝas Kasper, artisto. Tiuj tri homoj kaj kelkaj aliaj ofte drinkas kelkajn glasojn da brando kune en vindomo "La granda marserpento". Ĉe la glasoj oni volonte diskutas religiajn temojn. Ni povas aŭdi diskutojn tiajn:

— Por la diablo, kion vi diris, Kasper, ĉu oni aliformigas la biblion? —

— Jes, respondas Marin, oni ĉiam aliformigis kaj ŝanĝis la enhavon de la biblio kaj tion oni ankoraŭ faras. En la biblio de via patro, se li havis tian, estis skribita, ke Jesuo respondis al sia patrino, dum la geedziĝa festo en Kana, kiam ŝi volis montri sin lerta kaj petis Jesuon mirakle havigi kelkajn botelojn: "Virino, kion mi havas kun vi?" Sed en la plej nova biblio, la biblio de reĝo Gustavo V, estas pli boneduka tono, ĉar tie estas skribite, ke Jesuo diris: "Lasu min, patrino".

— Sed, estas plej kredeble nur traduka eraro, ili korektis, — diris Kasper demandante.

— Ne, male, estas nova erartraduko, ili faris al ĉiuj aliaj tekstoj, respondis Marin.

Leŭtenanto Jaegerstam vizitis la

lokojn, kiuj estas preparolitaj en Nova Testamento kaj ŝajnis al li, ke li rekonis la lokojn, kaj li ekmemoras kaj rakontas al sia amikaro, ke lia animo en pli frua tempo estis enlokita en tajlorokorpo en Galileo, kie li estis filo de tajloro. (En tiu ĉi okazo la aŭtoro do uzas la religion pri renaskiĝo por pruvi, kion li diras. Vere bona ŝerca metodo. Se la religioj neas pri lia rakonto, ili same bone devas nei pri la ebleco renaskiĝi.) El sia infaneco tie ĉi, 1900 jarojn pli frue ol ni vivas, li memoris junan viron kun la nomo Jeŝuo aŭ Jesuo, filo de masonisto Josefo. Jesuo estis inteligenta knabo; tial li venis kiel tajlorlernanto al mia patro, rakontas leŭtenanto Jaegerstam, kaj daŭrigas: "Mi memoras, ke mia patro ne trovis lin sufiĉe diligenta kaj lian karakteron ŝanceliĝanta. Tamen, por la tajloro metio li ne havis talenton." Estis je la tempo, kiam unu Mesio kun nomo Juda-Juda de Galileo organizis ribelojn en Galileo, kaj kiam Jesuo dum kelkaj tagoj estis for, liaj fratoj timis, ke li aliĝis al la ribelantoj. Sed baldaŭ oni eksciis, ke Jesuo mem vagadis predikante. Li legis libron, kiu dum tiu tempo estis tre ŝatata plezurlegaĵo, nome: "La aperaĵo de Daniel". Tiu libro aperis ankaŭ en aramea lingvo, kiun la malriĉa klaso konis. La libro pri Daniel profetis pri Mesio, kiu alvenos por savi la judan popolon el la premo de la romanoj. Tion Jesuo legis, kaj nun li predikis la samon. Baldaŭ li eĉ imagis sin mem esti la "Homofilo", la vera Mesio. — Dum tiu tempo ja estis multaj, kiuj trompis la popolon, asertante, ke ili estas la antaŭ-anoncita Mesio. Al tiuj falsaj mesioj la judoj donis la nomon "Barabba". La aŭtoro provas pruvi, ke la vorto "Barabba" devenas de la vortoj "bar" = filo kaj "abba" = patro, kaj ke en la biblio preparolitaj Jesuo kaj Barabba estas la samaj personoj, ĉar iaforte oni parolas pri Jesuo, aliam pri Barabba kaj pri Jesuo Barabba.

Dum la paskotempo estis en Jerusalemo grandaj festoj de la judoj. Okazis, ke Jesuo alvenis tien dum paskofesto. Jaegerstam rakontas, ke dum tiu tempo li vizitis Pilaton pro ia oficiala tasko. Okazis ribeloj sur la Temploplaco. Roma militistaro alvenis kaj estis grava interpuŝiĝo. La anoj de Jesuo, kiuj ne

havis armilojn, forkuris, sed multaj vundiĝis kaj multaj mortigitaj restis sur la placo. Kelkajn oni arestis, kaj unu el la arestitoj sciigis, ke Jesuo, kiun la romanoj suspektis kiel ribelgvidanton, dum la lastaj noktoj loĝis en malplena oleobarelo en Getzemane, ĉe l'Olivomonto. Kaj tie la soldatoj trovis lin. La kaŭzo, kial li ne forkuris, diras Jaegerstam, dependas de tio, ke li mem kredis pri helposoldatoj de la Ĉielo. Dum la juĝoproceso la anoj de Jesuo ne ĉeestis. Pilato juĝis: "Vi nomis vin la reĝo de la hebreoj. Vi aranĝis ribelon. Vi devas morti sur la kruco" — tre ordinara puno por ribeluloj. Sed Antipas volis vidi Jesuon, kaj kiam oni gvidis lin al Antipas, tiu treege ŝercis kun li, moke li vestis lin kiel reĝon. Antipas pritraktis Jesuon kiel konkuranton, kaj nun li ĝojis, ke ĉi tiu konkuranto devus morti.

Oni ree kondukis Jesuon al Pilato kaj la popolo kriis: "Liberigu al ni Jesuon. Donu al ni Jesuon Barabbas!"

Kaj ĉar Pilato aŭdis, ke Antipas ŝercis kun Jesuo, li decidis liberigi Jesuon por moki Antipason. Kaj Pilato sciigis... "Judoj, okaze de via solena festo mi tiun ĉi fojon volas montri min humana Jesuo Barabba estu libera!"

Kien Jesuo poste migris, mi ne scias, rakontas Jaegerstam. Sed kiam mi du jarojn poste estis en Tiberio, mi ekaŭdis, ke inter la malnovaj amikoj de Jesuo kaj liaj anoj en Galileo estis vera, senduba kredo, ke oni krucumis lin. Kiam mi pripensis, mi trovis ilian kredon tute natura, mi komprenis, kiamaniere la kredo aperis. Neniu el la plej proksimaj amikoj de Jesuo, neniu el liaj nunaj lernantoj kaj apostoloj ĉeestis la juĝejon. Kaj ili ne povis scii kaj tute ne kredi, ke Pilato liberigis lin. La fiŝkaptisto Simono kaŝis sin en la proksimo de la urbo, ne kuraĝis sin montri. Tiel ankaŭ same okazis kun la aliaj. Sed el la eksterajo de la urbo ili vidis, kiel oni starigis krucojn sur Pendigilmonteto, altaĵeto norde de la urbo, kaj ili vidis, kiel malliberigitaj juĝataj pro mortigoj ktp. dum la ribelo estis pendigitaj. Eĉ ne momenton ili povis ne kredi, ke Jesuo ne estis inter la pendigitaj. Ili vere povis, en bona kredo, diri, ke ili per propraj okuloj vidis kiel oni krucumis Jesuon.

Sed la fiŝkaptisto Simono renkontis lin kelkajn tagojn poste. Simono povis juri, ke li vidis lin tute vivanta, kia li estis antaŭ la krucumo, kaj Jesuo eĉ manĝis du rostitajn fiŝojn, por kiuj Simono lin invitis, kaj du religie kredantaj virinoj same lin vidis. Kaj poste multaj aliaj ne volis esti malpli bone informitaj. Baldaŭ estis multaj, kiuj diris, ke ili vidis la krucumon sur la Pendigilmonteto kaj ke ili poste vidis Jesuon vivanta. Tiel, fiŝindaj personoj, kiel Simono, povis garanti, ke li reviviĝis el la morto. Oni kredis tion, kaj per tia kredo la reviviĝo valoris kiel pruvi.

En tia formo la leŭtenanto Jaegerstam

Literaturon riĉan bezonas SAT!

Vi helpas trafe al ĝia kreado, aĉetante la **AKCIOJN** de la **ELDON-KOOPERATIVO!** — Prezoj:

Serio A = 1 dolaro,

Serio B = 1/2 dol.

Turnu vin al la **Administrejo de SAT,**
Colmstr. 1, Leipzig O 27.